



Informoj:
Arto :- Literaturo
Turismo :- Seligoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakcio:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

MALNOVAJ PAĜOJ

La nuntempaj Esperantistoj, kiuj por la ellernado de la lingvo posedas plej detalajn gramatikojn kaj vastampleksajn vortarojn, ne povas imagi al si la malfacilaĵojn de la unuaj jaroj, kiam nur ekzistis esperantaj lernolibretoj, kiuj konsistis el la dek ses gramatikaj reguloj kaj vortareto enhavanta cirkaŭ 800 aŭ 1.000 radikojn.

El tia malvasta materialo la unuaj Esperantistoj, veraj kreintoj, sciadis konstrui mirindajn verkojn, kiuj montras ankoraŭ belegan freŝecon kaj eble por multaj Esperantistoj pli allogan simplecon ol la nunaj tekstoj, en kiuj eble tro ofte svarmas tre komplikaj esprimoj kaj multaj novaj radikoj, kiuj ne estas necesaj kaj nur malfaciligas la lernadon de la neŭtrala lingva fundamento, kiu faras el homaro unu grandan rondon familion.

Ĉar multaj el tiuj malnovaj tekstoj estas jam elĉerpitaj kaj la Esperantistoj ne povas nun ilin legi, ni decidis represi en NIA VIVO kelkajn pecojn el tiaj malnovaj tempoj por, ke niaj legantoj povu sin amuzi admirante en ĝiaj infanaj aŭ knabaj trajtoj, la ĉarmon de la unuaj paĝoj, en kiuj la talento de la verkisto multe helpis al la trafeco de de la esprimoj kaj al la lerta konstruo de la vorto, kiun devigis la komenca malmultnombro de la esperantaj radikoj.

Ĉar la loko disponebla en nia revuo estas tre malgranda, ni povos elekti nur mallongajn tekstojn aŭ pecojn el longaj rakontoj. Malgraŭ tia bareco ni esperas, ke niaj legantoj ĝojos konatigante kun tiaj interesaj paĝoj el la unua pionira epoko de nia koramata lingvo.

KREDO

Se longa aŭtuna nun estas vespero,
Se nokto ĝin sekvas kun pluvo kaj vento,
Ni ĉiam kun forta animo kaj sento
Atendu matenon... Ho, vivu esperol!

Post nokto ja tago, post vintro—somero
Necese aperas en sia momento;
Finiĝos ripozo, rompiĝos silento,
Kaj vivo majesta ekbrulos sur tero...

Se eĉ iafoge nin premas doloro,
Ne perdu kuraĝon; sur nia ĉielo
Ekbrilos potence loganta nin stelo.

Kaj riĉe nin kovros per lumo de gloro,
Ne diru per vortoj, ne pensu en koro,
Ke vana espero, ke penoj—sen celo!

I. LOJKO.

Eltirita el «Esperantisto», n-ro 47, oktobro 1893.

SCIENCAJ VULGARIGOJ

Naturkolora fotografado

Kvankam la problemoj kapti la naturajn kolorojn de la objektoj per fotografaj rimedoj estas jam solvita de longe, eble multaj el niaj legantoj ne konas la fizikan fundamenton de la procedo nek ĝiajn koncernajn detalojn.

Ĉiuj ja scias, ke en la komuna fotografado la lenco aŭ lencoj, el kiuj konsistas la kamera objekto, ĵetas dum pli-malpli longa momento sur la plakon aŭ filmon lokitan post si la inversigitan bildon de ĉio, kio estas antaŭe kaj tio, per tute naturaj koloroj, kiuj tamen malfeliĉe ne restas poste sur la kliso, tial ke ili nur efikis sur ĝia sentema ŝmiraĵo laŭ sia pli-malpli granda heleco, sed ne laŭ sia koloro mem.

Oni tamen sukcesis reprodukti la bildajn kolorojn sur la kliso per kelkaj pli-malpli rektaj rimedoj, el kiuj ni nur priskribos tiun de Lumière, kiu montriĝis en praktiko la plej taŭga kaj simpla.

Ĝia fizika fundamento estas la trikolora teorio, laŭ kiu per nur tri koloroj, nome: ruĝa, flava kaj blua, oni povas sukcesi produkti ĉiujn aliajn, miksaĵojn laŭ diversaj kvantoj; ekzemple: per mikso je blua kaj flava koloroj oni estigas la verdan; per mikso je flava kaj ruĝa, tiun oranĝan, kaj per mikso je ruĝa kaj blua, tiun violan. La diversaj nuancoj dependas el la proporcio, laŭ kiuj la koloroj estas miksitaj. Kompreneble, ankaŭ ekzistas senlima nombro da koloroj devenantaj el la tri fundamentaj diversproporcioj mikitaj, inter ili la blanka pli-malpli pura; sed por tio estas necese, ke la miksaĵo ne estu sorbaĵa, sed luma.

Ni klarigos tiun diferencon: la ruĝa vitro aspektas ruĝa, tial ke ĝi sorbas la aliajn kolorlumojn, kiuj alvenas al ĝi, kaj nur lasas trapasi tiun ruĝan; sed, se ni metas unu post la alia du kolorigitajn vitrojn, ekzemple ruĝa kaj blua, la unua nur lasos pasi la ruĝan lumon, sed ĉi tiu estos haltigata de la dua, ĉar tra ĝi nur povas pasi tiu blua; do rezultas, ke nenia kolorlumo povos trapasi ambaŭ vitrojn kaj sekve rezultos mallumo. Same okazas ĉe la koloriloj, sed ne ĉe la lumoj; ekzemple: se ni vidas samtempe rebri-lantajn sur blanka tuko ruĝan, flavan kaj bluan projekciatajn lumojn, rezultos el tio blanka lumo, se ili estas laŭ la koncerna proporcio; same, kiel se ni vidas mozaikon konsistantan el eretoj el tiuj koloroj, tiel malgrandaj, ke ni ne povu vidi ĉiun apartan eron, sed nur ilian tutajon.

Ĉi tiu sama aranĝo estas ĉe la kliŝoj por la naturkolora fotografado, sed per tiu diferenco, ke ili devas esti trae rigardataj, anstataŭ rebrile, kaj ke la fundamentaj koloroj de la mozaiko estas la oranĝa, verda kaj viola, kiuj ankaŭ laŭ difinita proporcio produktas blankon, tial ke finfine nur la tri simplaj koloroj estas en ili.

Naturkoloraj plakoj havas du tre malsamajn partojn: travidebla mozaiko kaj emulsio.

La travidebla mozaiko konsistas el miksaĵo laŭ la koncerna proporcio je oranĝkoloraj, verdaj kaj violkoloraj eroj, kiuj estas fekulgrajnoj malgrandaj de 10 ĝis 15 milonoj da milimetro ĉe sia diametro.

Post elektado je tiel etaj grajnoj oni disigas ilin laŭ tri partoj, ĉiu el ili kolorigitaj laŭ unu el ĵus nomitaj koloroj per taŭgaj tinkturoj.

Oni tuj miksas ilin, zorgante pri tio, ke oni prenu el ĉiu koloro la bezonatan kvanton, por ke ĉienu el ili estu speciale videbla kaj la tuto ŝajnu blanka. Tiu ĉi miksaĵo tre intima kaj ĉie samproporcia el la tri kolorigitaj pulvoroj estas supersutata tre egale, per speciala maŝino, sur vitrajn plataĵojn antaŭsmiritajn de glujaĵo.

Post tio ĉi estas nepre necese kovri ĉiujn spacetojn restantajn inter la grajnoj, kion oni sukcesas fari per alia aparato supersutanta ĉien egale, sur la vitron, subtilegan, karbon pulvoron. Ĉi tiu pulvoro restas fiksita inter la grajnoj per la jam menciita, tute travidebla gluŝmiraĵo. La tiel pretigita plako estas lamenata, por ke ĝiaj fekulaj grajnoj platiĝu kaj konsistigu kvazaŭ travideblan, trikoloran mozaikon.

La nombro de ĉi tiuj eretoj estas de 6.000 ĝis 7.000 en ĉiu kvadrata milimetro; t. e. ke oni tute ne povas aparte distingi ilin per senhelpa vidado. La fakto, ke en vulgarformata plako granda je 43×18 centimetroj estas 14000000 da kolorigitaj grajnoj, komprenigas baldaŭ ilian egan subtilecon.

Ĉi tiu grajnaro estas tuj ŝirmata per glazuraĵo, kiu izoligas ĝin el la emulsio.

La fotografa emulsio devas esti sufiĉe rapida, por ke oni povu impresi ĝin dum tempo ne tro longa por la praktikaj aplikoj. Ĉi tiu emulsio devas ankaŭ esti same sentema por ĉiuj koloroj kaj formi tre maldikan tavolon, por ke ĝi povu esti reduktata laŭ sia tuta dikeco de la lumo trairinta la kolorigitajn erojn.

Estas memkompreneble per la ĵus priskribita konsisto de la naturkoloraj plakoj ke ilia fabrikado estas afero treege delikata kaj, ke oni devis venki multegon da malfacilaĵoj, antaŭ kiam oni sukcesis atingi, ke ili estu sufiĉe perfektaj por sia fotografa utiligado.

Nun ni vidu, kiel la koloroj de la objektoj povas esti fiksataj sur la kliŝo kune kun la ordinara formbildo.

Por tio ni supozu verdan ajon antaŭ la fotografa aparato, en kies fundo estas naturkolora plako same metita, kiel tiuj vulgaraĵoj, sed kun la emulsiita flanko posten, anstataŭ antaŭen, por ke la lumo venanta de la objektivo estu devigata trairi la mozaikon, antaŭ ol atingi la senteman emulsion.

La lumo projekciata de la lencaro estas ankaŭ verda kaj bildas sur la plakon kiel kutime la antaŭe lokitan ajon; sed tiu lumo devas trairi, antaŭ ol atingi la sentŝmiraĵon, la travideblan mozaikon, sed, ĉar ĝi estas verda, tute povos pasi tra la verdaj fekulgrajnoj kaj nur duone tra la aliaj, kaj la plakpartoj tuj post ĉi ĉiuj estos proporcie impresataj: do ni ricevos bildon konsistantan el etaj punktetoj rilatantaj la verdajn bildkoncernajn grajnoj de la mozaiko kaj ankaŭ la aliajn, sed pli helaj la unuaj, ol la duaj.

La plakon poste oni rivelas simile, kiel la ordinaraĵn, kaj aperas sur la emulsiita flanko la ĵus dirita punktita bildo. Oni tuj malaperigas ĝin per arĝentsolvema bano kaj restas sur la plako la ankoraŭ ne impresitaj partoj el emulsio kiu poste estas rekte metata antaŭ forta, blanka lumo, por ke ĝi tute impesiĝu sur tiuj ĉi partoj kaj ili fariĝu nigraj per rivelado.

Tiamaniere ni havas kliŝon, en kiu la partoj de la emulsio rilatantaj la verdan ajon tute malaperis kaj estas do travideblaj kaj, kontraŭe, la aliaj partoj estas duone nigraj kaj sekve nur duone travideblaj.

Se ni rigardas nun la kliŝon tra la taglumo, ni vidos la aron de grajnoj, ne unuope travideblaj, kiuj formas la bildon de la fotografita objekto kaj, pro tio mem ke la verdaj estas la plej helaj, ĝi ŝajnos al ni verda same, kiel la objekto reale estas.

Kompreneble, analoge okazos pri la aliaj du mozaikaj koloroj oranĝa kaj viola. Rilate al tiuj

simplaj, ekzemple la ruĝa, ĝi duone videbligas la orangajn kaj violkolorajn erojn de la mozaiko, sed ne la verdajn, kaj en nia okulo miksiĝos ambaŭ koloroj, produktante la samam impreson, kiel la ruĝa; t. e.: la koloro de la objekto.

Se nun ni fotografas iun ajn aferon; nome: personon, objekton, pejzaĝon, ktp., en kiu estas multego da diversaj koloroj kaj nuancoj, ĉiu el ili efikos, kiel se ĝi estus sola, kaj poste ni tra la kliŝo vidos ruĝajn la partojn de la bildo rilatantajn ruĝajn partojn de la fotografita afero, flavajn la flavajn, verdajn la verdajn kaj same la ceterajn, sukcesinte tiamaniere havi bildon de la afero tute nature kolorigitan kaj ne kaprice nek artefarite, kiel ĉe la pentraĵoj.

Tamen, por ke la koloroj estu ĝustaj, estas nepre necese, ke la proporcio de la fekulgrajnoj el la tri koloroj estu kiel eble plej ekzakte farita, kion oni povas scii, ĉar tiam la mozaiko ŝajnas blanka.

Tial ke ne ĉiuj koloroj samkvante impresas la senteman emulsion, por kompensi iliajn diferencojn, oni metas antaŭ la objektivon speciale kolorigitan vitron, kies celo estas malgrandigi la helecon de la plej impresemaj koloroj, egalande ĉies efikon sur la emulsio.

La aspekto de ĉi tiuj kliŝoj, precipe se ili estas rigardataj per stereoskopo, estas tiel mirige reala, ke ĝi ŝajnas al ni, kvazaŭ ni ĉeestus antaŭ la fotografita sceno, al kiu nur mankas la concerna movo.

RAMÓN DE SALAS.

VALENCIO KAJ ĜIA EKSPOSICIO

el Teodoro Llorente

Ĉe l'ombro ravoplana
De l'orangarb'
Kantas bela knabino
Pri sia am'.

Ŝi susuras: «mi estas
Blank—kolombin'
Sur verda branĉ' ne sidas
L'amata bird'.

Ĉie brilas, ridetas
Bela printemp'
Mia kor' sopiradas
Sidi ĉe nest'.

Mian plendon ne aŭdas
Vi, kar-amant'?'
Tiel kantas knabino
Pri sia am'.

Estas knabin'—l'amanta Valencio,
Kolombin', kiu revas pri kunul'.

«Larmojn elviŝu, li ne vin forlasis
Okulojn levu, ĉar li venos tuj.

Aglaĵn flugilojn portas li kaj kronas
Lian kapon plensuna radiar',
Li—la Progres'—etendas al vi manon
Kaj faras vin reĝin' de sia land'!»

El la valencia lingvo tradukis,
VICENTE INGLADA.

ĈE SORĈISTINOJ

(Daŭrigo)

De tia lando, devenis maljunulino, sulkiĝita kaj malgrasa, kiu, mi ne scias pro kiaj akcidentoj loĝiĝis en centra paroĥo de Serantes, pli terkultura kaj malplimara kaj tute malsimila je «San Xurxo.» Eble, ŝia elmigro estis kaŭzita de la plej granda utileco por vendi la lakton el du kaprinoj, per kio ŝi vivis kaj pro la plej granda utileco kiun produktis al ŝi, la divenado de la estonteco per la ludkartaro; pri tio, ŝi baldaŭ atingis famon kaj klientaron, ne nur de vilaĝaninoj, sed de elegantaj ferrolaninoj kiuj iris preĝi al la «Virgulino de Chamorro» por la edzo aŭ la fianĉo forestintaj en Cuba aŭ Filipinas, kaj samtempe por ke la masstrino Nemesia faru divenadon al ili.

Oni ne memoras, aŭ almenaŭ mi ne scias, ĉu inter la antaŭuloj de la maljunulino estis okazinta iu edziĝo, tamen ŝi havis nepinon, Calixta, tridekkvinjara, kaj, unu pranepinon, Rosiña, kiu estis dekkvinjara ĉarmulino.

Kun klarvidebla malamikeco tiuj de Serantes ricevis masstrinon Nemesia, unue ĉar ŝi devenis el «San Xurxo» kaj pro tio ŝi estis nepre sorĉistino kaj ne malmulte, ankaŭ, ĉar la kaprinoj estas la plej petola kaj malbenata brutaro kiu povas ekzisti ĉe terkultura lando; iliaj dentoj, kiujn la terlaboristoj opinias venenhavaj, ne kontentiĝas per la folioj, sed preferas le arbustojn kaj arbestojn, kies burĝonojn kaj ŝelojn ili senkarnigas, mortigante fatale la vegetaĵon; malbonaj najbaroj estis la «Roxa» kaj la «Moura» (tiel estis nomataj la kaprinoj de masstrino Nemesia), kiuj vivis je la kosto de la lando, tial ke ilia masstrino ne posedis eĉ malgrandan pecon da tero; post malmultaj monatoj ne restis sendifekte eĉ unu ĉirkaŭilo kaj juna arbo, ĉerisujo aŭ pino, kiun ili povis atingi, starante sur la hufpintoj.

La malamo kreskadis kontraŭ la sorĉistino de «San Xurxo», kaj eĉ al ŝia raso kaj brutaro, pluvante sur ŝin la insultoj kaj post la insultoj la battoj.

Kaj tie ĉi mi komencas mian konon kaj amikecon kun la sorĉistino de San Xurxo, kiun mi devis viziti pro bruteca batado donita de la edzino

kaj du fortikaj filinoj de riĉa terkulturisto. Antaŭ kvardek ses jaroj, mi alvenis al la distrikto kun la animo virga, malfermita al ĉiu nobla kaj justa sento; ignorante ĉiujn insidojn kaj malbonajn rimedojn kamparanajn. Tial, ĉar mi prijuĝis tion malnoblaĵo, mi rifuzis la aferon, kvankam premis min, per sia influo, la vilaĝestro, sekretario, kaj amikoj.

La malfeliĉa maljunulino inspiris kompaton al kiu havus koron, sennombraj ekimozoj kaj skurĝosignoj kovris sian malgrasan korpon, vizaĝo kaj brakoj, brusto kaj dorso estis preskaŭ senĉesa violkolora makulo, sed la plej grave estis, ke la traŭma-pleuro pulmonio estis deklarita; estas ne eble kaŝi tion; la afero transiris al juĝejo de Ferrol kaj mi devis ĉiutage viziti tiun strangan virinon, tiel strangan, kiel mi neniun alian vidis.

—Helpul, sinjoro, helpu nin!, singultploris laŭhore la tri virinoj; helpu, defendu nin! Kaj tuj komenciĝis letanio.

—Ke Dio faru al vi bonon, ĝemis la maljunulino.

—Ke viaj moneroj fariĝu oraj, diris Calixta.

—Ke vi atingu ĉion, kion vi deziras, aldonis Rosiña.

—Ke la teraj bonoj vin supersutu.

—Ke viaj gepatroj vivu centon da jaroj.

—Ke reĝino amegu vin, ĝemis Rosa.

—Ke vi havu tiom da bonoj, ke viaj manoj ne sufiĉu por disdoni.

—Ke neniam vi sciu, kio estas malriĉeco kaj doloro.

—Ke viaj manoj kaj okuloj estu por la malsanuloj, kiel tiuj de Nia S-ro Jesukristo.

—Ke per palpado ili resanigul

—Ke per rigardado ili kuracul

—Ke pripensante pri vi, la malsanuloj resaniĝul

Tiuj petegoj ŝajnis laŭhora psalmaro, mistika ekzorco, religia himno kun ĝiaj parafradoj kaj ripetadoj; ili rememorigas al mi la Vedajn himnojn, la benojn al Agni, fajra Dío kaj Patro de vivo.

(Daŭrigota).

SPRITA RESPONDO

Sur la strato piediras almozulo, de unu al alia domo, almozpetante. Li trovas domon, kies stratpordo estas fermita kaj li prenante la pordfrapilon batas unu fojon, neniun respondas al li. Denove li batas, sed du batojn. Li ricevas saman respondon. Poste li batas tri fojojn kaj oni respondas al li per silento, kiam li alvokas la kvaran fojon, sur la fenestro de la kvara etaĝo elmontrigas maljunulo, kiu demandas al la almozulo:

—Kion vi deziras?

—Mi deziras paroli kun vi, sinjoro.

—Bone, mi tuj malsupreniros, diris la maljunulo. Kaj efektive li malsupreniras kaj malfermante la pordon parolas kun la almozulo, kaj diras al li:

—Vi diros kion vi volas.

—Mi petas de vi almozon, sinjoro.

La maljunulo, miregante pro tiu demando diras:

—Bonvolu supreniri kun mi.

Tion ili faris kaj, kiam ili estis jam en la kvara etaĝo diris la maljunulo al la almozulo:

—Sinjoro, ke Dio protektu vin.

J. M.^a UÑEZ.

SCIIGOJ

Nia honora Prezidanto S-ro Manuel Maynar Barnolas estis elektita Prezidanto de la Komercesta Kazino, la plej grava klubo de Zaragoza, kiu multfoje praktike elmontris sian simpatian por Frateco kaj Esperanto.

Ni tutkore gratulas S-ron Maynar pro tia meritita posteno kaj la Komercistan Kazinon pro la elekto de ja inda Prezidanto.

Ni petas de la fratecanoj, kiujn ne regule ricevis NIA Vivo, ke ili bonvolu sciigi al ni pri tia difekto, por korekti ĝin.

XXIV^a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo-Tiu ĉi kongreso okazos de la 30^a ĝis la 6^a Aŭgusto 1932. Por tiu ĉi kongreso L. K. K. starigis kategorion de Helpkongresanoj por tiuj, kiuj ne povos ĉeesti la kongreson, sed tamen deziras subteni tiun internacian feston kaj ankaŭ ricevi la dokumentojn; la kotizo por tiu kategorio estas 50 fr. frj.

Por la hispanoj, kiuj volos partopreni en tiu kongreso la H. E. K., pere de la Orienta Federacio, atingis rabaton (40 %) sur ĉiuj fervojoj hispanaj; sin turnu al S-ro Andrés Piñó-S-tro Colón, 24-Valencia.

La aragonaj filatelistoj starigis societon ĉe Frateco, kiu plezure oferis al ili sian helpon. Ni deziras, ke ili prosperu kaj rapide kresku.

Radiostacio-Valencia (Hispanujo).—Ondolongo 226 ms. - 1127 kiloc. - Potenco 1 1/2 kw.—Ĉiuj aŭde de la 9h. 5m. ĝis 9h. 15m. (vespere), okazas dek minutoj de priesperantaj babiladoj, en hispana lingvo, kun esperanta saluto je la fino.

Partoprenas diversaj membroj el la Valencia Esperanta Grupo.

Oni disvendas ekzemplerojn de NIA VIVO po dek centimoj ĉiu numero.